**Praha-ek-1955-23-01**

No 23. Marto 1955 Aperas laŭbezone

ESTAS EBLE VIZITI ĈEĤOSLOVAKION!

Post esploro de ĉiuj reguloj, kiuj aperis okaze de la granda gymnasta festo Spartakiado kaj post bona pripenso de ĉiuj cirkostancoj ni trovis, ke ni povas inviti esperantistoj nunjare al vizito de nia lando.

La ĉeĥoslovakaj aŭtoritatoj donos enirpermeson al difinita nombro de eksterlandanoj, kiuj vizitos Spartakiadon, la grandajn gimnastajn festojn, okazontaj de la 23-a de junio ĝis 6-a de julio 1955 en Praha. Tiuj vizitontoj havos okazon vidi ankaŭ la pentrindajn regionojn de nia lando, multnombrajn historiajn memoraĵojn kaj povos observi la grandajn progresojn faritajn.

La ĉeĥoslovakaj esperantistoj deklaras sin pretaj akcepti kaj gastigi la eksterlandajn gastojn en mezuro de ilia ebleco kaj faciligi al ili tiel la restadon. Estas koncedataj fervojrabatoj kaj ekzistas diversaj faciligoj.

Ĉiu interesiĝanto sin turnu tuj – plej malfrue la 30-an de aprilo al ĉeĥoslovaka legacio de sia lando pri detaloj.

Post havigo de oficialaj informoj skribu aŭ al via ĉeĥoslovaka korespondanto aŭ al nia klubestro Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

-----

Samideano Josef F r i e d r i c h 65 jara

La dua numero de la Bulteno de EK en Brno informas pri la sesdekkvinjariĝo de konata s-ano Josef Friedrich, siatempe prezidanto de Ĉeĥosl. Esp.-Asocio.

Ĉiu, kiun lin konas, divenas, ĉu ne temas pri cifera preservo. Jes, ĉiam june vigla, sprita, bonhumora, same esperantem kiel turistema, ĉiam senlaca, porpaca laboranto esperantista.

Kara amiko! Ne niavole ni estas inter la lastaj en la longa vico de tiuj, kiuj sincere bondeziras al vi freon animan kaj korpan por la ontaj jaroj!

-jelĉ-

-----

REGIONA KUNVENO DE ESPERANTISTOJ EN BOHUMÍN

Dimanĉe la 27an de marto 1955 je la 9-a horo en kultura ĉambro de ŝtataj fervojoj konferencos la esperantistoj de la regionoj Ostrava kaj Olomouc. Posttagmeze post komuna tagmanĝo promeno al Esperanto – monumento. Nian klubon plej verŝajne reprezentos s-anoj Šustr, Mařík kaj Slanina.

-----

**Praha-ek-1955-23-02**



ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II. , Ve Smeĉkách 26 je la 20a horo. Depost la 19a horo samloke kurso por progresintoj, gvidata de Ant. Slanina.

Venontaj programoj:

16. 3. Dro Pravoslav Sádlo: anoncita prelego en marta numero, de nia bulteno.

23. 3. Eva Suchardová – Ant. Seemann: Jean Cocteau, la granda franca teatra aŭtoro

30. 3. Eli Urbanová: Pri mi mem. Poemoj kaj kanto. Kunlaboras Marta Ledková.

6. 4. Jan Zemek: Rakonto pri Hindujo.

13.4. Josef Vítek: Monda kroniko.

-----

Ni bedaŭras, ke dum februaro kaj marto neefektiviĝis pro teknikaj malhelpoj la proponitaj klubvesperoj de Dro Miloš Nývlt kaj Ant. Slanina. Ni programigos ilin en la plej proksima tempo.

-----

S-ano Gusto KRIVOŠ en Tisovec ne plu vivas. Lasta numero de nia bulteno revenis kun seka poŝta rimarko „zomrel“. Li esperantiĝis ne 1930 kelkajn jarojn pli poste kiel esperantisto li reprezentis komercan ĉambron de Rimavská Sobota dum la internacia konferenco de komercaj ĉambroj en Antverpeno. Dum la jaroj militaj li estiĝis urbestro de sia naskiĝurbo Tisovec. Post la laborplena vivo li havu trankvilan ripozon!

-jelĉ-

-----

KOREKTIGO: en nia pasintnumera informo pri la konferenco en Olomouc ni erare publikigis la nombron de la ĉeestantoj. Fakte partoprenis pli ol 200 esperantistoj, kiuj fondis provizoran Konsultan komitaton por helpi la laboron de uzinaj kaj OB-kluboj kaj rondetoj La EK OB 2 en Praha plene aprobas la fondon de KK kaj promesas sian larĝan kunlaboron.

-----

Prelegoj de nia membro Josef Vítek en la regiono de Ostrava la 22-an ĝis 25an de februaro. En sia letero s-ano Lička el Ostrava raportas, ke okazis entute naŭ prelegoj pri Lapplando /Karviná, Třinec, Ostrava, Olomouc/ kun entuta vizito de preskaŭ 3000 personoj. La laboro de Vítek, signifas ne nur grandan organizan sukceson de lokaj esperantistoj, kiuj en kadro de siaj uzinaj kluboj la prelegojn organizis, sed ankaŭ gravan poresperantan kaj porpacan laboron, kiu estis delikate prezentita kaj per la publiko ĉiuloke varme akceptita.

-----

Publikaj prelegoj kun svedaj kaj norvegaj filmoj kaj lumbildoj de Josef Vítek en Praha dum marto. Malgranda sceno de Osvětova Beseda en Praha 2, Ve Smečkách 25 /domo de nia klubejo/ aranĝas jenajn prelegojn de nia membro:

Dimanĉe la 13-an je la 16-a horo pro granda intereso ripetata la prelego „Lapplando – popolo kaj lando de sveda nordo“.

Dimanĉe la la 20-an je la 16-a horo „Svedlando de sudo al nordo“.

Dimanĉe la 27-an je la 16-a horo „Norvegaj fjordoj“.

-----

RADIO-ESPERANTA INTERSERVO. La franca radiostacio Radiodiffusion – Télévision Francaise en Parizo dissendis la 29an de januaro je la 22 – 24 horo en sia ĉiusabata programo „Bonsoir l´ Europe, ici Paris“ /Bonan vesperon, Eŭropo, ĉi tie Parizo/ esperantlingvajn salutojn de la francaj esperantistoj al iliaj korespondantoj en Eŭropo, inter kiuj estis ankaŭ nomoj de du ĉeĥaj samideanoj en Praha. Je la honoro de la esperantistoj oni post la salutoj dissendis /pro manko de la esperantlingvaj komponaĵoj kiel diris la anoncanto/ la kantrolon de Mimi el la opero „Bohema“ de Puccini!

-----

**Praha-ek-1955-23-03**



NI POVAS LIVERI kelkajn ekzemplerojn de „kvaropo“ de Auld-Dinwoodie-Francis-Rosetti kaj de „Bapto de Caro Vladimir“ de Havlíček-Pumpr. Prezo de ĉiu volumo Kč 35,-- afrankite. Mendu tuj, sed monon sendu nur post ricevo de nia pagilo. Ĝin ni sendos al la unuaj mendintoj. Atentu, ke estas haveblaj sole nemultaj ekzempleroj. Je nia sincera bedaŭro ni ne povas konsideri mendojn, kiuj amase venis jam antaŭ longa tempo.

-----

NIA SPEGULO. Al tiu ĉi brila Esperanto-cirkulero, aperanta en Trenčín, ni proponis kunlaboron, t. e. kunigon kun nia Bulteno. Ni senpacience atendas respondon al nia propono.

-----

HEROLDO DE ESPERANTO EN 1955. La eldonanto – sam. Teo Jung disponigis al ĉeĥoslovakaj esperantistoj dum nuna jaro denove senpage sufiĉan kvanton da tiu valora revuo por ke ni ne estu fortranĉitaj de la tutmonda movado esperantista kaj restu informitaj pri antaŭeniro de Esperanto en la cetera mondo. La revuon ricevos denove ĉiuj gravaj laborantoj en la movado, ĉiuj aktivuloj kaj precipe ĉiuj aktivaj grupoj. Ni petas hodiaŭ denove ĉiujn grupou, kiuj ankoraŭ ne ricevis nian pagilon por pago de ekspedo-kostoj, ke ili skribu al ni, donu iajn informojn pri nuna agado kaj indiku adreson de persono, al kiu ni ekspedu la revuon. Kiu la pagilon ricevis, sendu al ni la sumon tuj, por ke ni povu baldaŭ aranĝi la distribuon en 1955. Sumon eventuale tropagitan ni uzos por Esperanto-celoj. Por la sama celo estos uzita - post interkonsento kun sam. Jung, kiu grandanime rezignas pri ĉiu enspezo el tiu ĉi fonto – ankaŭ KELKAJ ABONOJ AL „HEROLDO“, kiujn ni proponas al seriozaj interesuloj en nia lando. Abono kostas 40 Kč kaj estas sole nemultaj ekzempleroj disponeblaj.

-----

INFANOJ DE LA MONDO. En tiu ĉi entrepreno de emitenta signifo ni pruvu al la cetera mondo la lemon kaj laboremon de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, se ni ne povas paroli pri forto de nia organizo. Ni rememorigas, ke temas pri verko, kies aŭtoroj estos infanoj. Speciala parto estos dediĉita al infanoj ĉeĥoslovakaj kaj estas tasko de niaj infanoj, de iliaj gepatroj kaj de iliaj instruistoj, ke ili liveru valoran kontribuaĵon, tekstojn kaj bildojn, por tiu ĉi ĉeĥoslovaka parto. Ĉion sendu al Infana Fako de Heibon-Ŝa, Yonbantyo, Tiyodaku, Tokio, Japanio. Ni daŭre informos pri progreso de tiu ĉi afero.

-----

DOMSIGNOJ. En tiu afero nepre nenion plu sendu al ministerio de kulturo. Se vi havas ankoraŭ ian bonan materialon , liveru ĝin senpere al sam. H. W. Alings, Middenweg 226, Amsterdam O. Tiu ĉi afero bone sukcesis kaj eble ni havos okazon doni ĉi tie detalojn.

-----

OSTRAVA. La Kleriga Konsilantaro kaj Uzina klubo VŽKG komencis novajn kursojn por komencantojn kaj progresintojn la 16an de februaro ĉiumerkrede. Instruas s-ano Slaný, Kočvara, Adámek kaj Skvrňa. 25 ĉeestantoj. En Ostrava VIII – Hrabůvka esperantistoj, kuniĝintaj en la Uzina klubo de la karbminejo Petr Bezruč, malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, faras ĉion, kio estas en ilia forto. Ili kunvenas kaj instruas kvar novulojn.

-----

PARDUBICE. Ni konstatas ĝojigan pliviglîĝon de loka grupo, kiu aranĝas kurson por progresintoj. S-ano Oldřich Hrubeš, Stalingradské nám. 55 ekfunkciis kiel delegito de UEA.

-----

ĈEĤA ESPERANTISTO, 50 jara fraŭlo, serĉas ĉeĥan samideaninon, bonaniman idealistinon, inteliĝentan, blondharan 35-40 jaran. Afablajn proponojn kun fotografaĵo bonvolu sendi al koresponda adreso de nia klubo.

-----

------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Proksima numero aperos komence de aprilo.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

**Praha-ek-1955-23-04**

VERDA VOĈO

PRINTEMPO 1955. SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN D O K S Y.

NI ESTU ESPERANTISTOJ!

Esperanto estas lingvo. Per lingvo oni esprimas sian pensojn kaj ideojn. Ju pli perfekta estas la lingvo des pli facile oni povas stimuli la ideojn. Esperanto, dank al geniem de Zamenhof, estas lingvo esprimriĉa, facile lernebla kaj internacia. Ĝi dependas de neniu unuopa nacio, sed de la tuta homaro. Nin Esperantistojn neniu devas instigi al paco; ĝuste pro tiu ĉi ideo ni fariĝis Esperantistoj. Kaj kiu atakas nin, mem rompas la pacon. Ne estas necese laŭte paroli, sed kviete labori kaj servi al tiu nobla celo, kiel ni faras…

Per lingvo oni esprimas siajn pensojn kaj ideojn, mi diris de komenco. Sed tiun lingvon oni devas regi por esti kapabla esprimi sin ne nur skribe, sed ankaŭ parole. Post la venko ĉe Unesko ni havas pli respondan devon. Ni devas Mondi, ke Esperanto estas vere lingvo parolata, ke oni fine ĉesu nin rigardi kiel balbutantojn, strangulojn. Estas vere dolore, se oni rekontas malnovan samideanon en klubo kaj li ĉe esperanta alparolo diras: „Pardonu, mi komprenas, sed paroli mi ne kapablas.“ Estus vere interese scii, kiom da esperantistoj flue parolas Esperanton!

A. S.

-----

Karolo Píč: P R I N T E M P O

Estas printempo,
Estas ĵaŭd´.
Ekstere pluvas:
Plaŭd! Plaŭd! Plaŭd!

Estas printempo.
Sur tegment´
kuras petola
varma vent´.

Pluvo fenestrojn,
skurĝe lavas.
„Ĉu“, ŝi demandas,
„li min amas?“

Kaj vent´ responde
sen ekĉes
muĝe rediras:
„Jes! Ne! Jes!“

Estas printempo.
Estas ĵaŭd´.
Ekstere pluvas:
Plaŭd! Plaŭd! Plaŭd!

-----

Estas printempo kaj baldaŭ venos somero. Baldaŭ venos por ĉiu libertempo. Ĉu vi dezirus travivi parton de via libertempo en Somera kolegio de Esperanto en Doksy, kies kursoj estas tiel ŝatataj kaj alte taksataj. Ĉu vi volas fariĝi parolantaj Esperantistoj? Ĉu vi volas travivi neforgeseblajn du semajnojn en verda familia rondo? Se jes, do skribu afable dezirante informojn al Somera kolegio de Esperanto, s-ano Václav Špůr en Doksy u Máchova jezera.

-----